Zone €uro - €ŭroejo : 3,50 €
Autres pays - Aliaj landoj : 4,50 €

Organe de l'Union des Travailleurs Espérantistes de langue française

# La SAGO

La SAT-Amikara GazetO

*Espéranto : vers une culture sociale sans frontières*
*Esperanto : al senlima socia kulturo*

sat-amikaro.org

Bimestriel - Dumonata
167+
SAT-KONGRESO 2026


RET-REVUO

# 99a Kongreso de SAT:

## "Paco kaj militoj. Datreveno de la Hispana Enlanda Milito"

La 99a SAT-Kongreso okazos en la urbo Leono inter la 19a de julio 2026 kaj la 26a de julio 2026. La kongreso koincidos kun la 90-jariĝo de la Hispana Enlanda Milito, kiu daŭre estas fonto de aktivaj debatoj en Hispanio, ĉefe rilate al la movado por rekuperado de historia memoro, kiu inter aliaj aferoj baraktas por identigi ekzekutitojn de la frankisma reĝimo, iam enterigitaj amastombe, por ke la familioj povu disponi digne de iliaj restaĵoj. La programo de la kongreso enhavos aktivecojn rilatajn al tiu memordato. La temo de la kongreso estos "Paco kaj militoj. Datreveno de la Hispana Enlanda Milito".





# SAT-KONGRESEJO



Estas plezuro anonci, ke la loko de la kongresejo jam estas konfirmita. La Fondaĵo Sierra Pambley (fama en la urbo pro sia kultura kaj eduka agado) akceptis la proponon iĝi la kongresejo de SAT.

La konstruaĵo de la Fondaĵo, en kiu okazos la kongreso, estas interesa ankaŭ pro tio, ke ĝi enhavas muzeon kaj bibliotekon. Situanta ĝuste en la urbocentro de Leono, ĉe la katedrala placo, la kongresejo troviĝas nur kvar minutojn piedirante for de la rezidejo. Jen ligilo al ĝia retpaĝo:

https://www.sierrapambley.org/fotos-sierra-pambley/

**Revue bimestriel de SAT-Amikaro**
132/134, bv Vincent-Auriol, 75013 Paris
Tel. : 0 *(0 33)* 9 53 50 99 58
sekretario@sat-amikaro.org
**Retejo** : sat-amikaro.org

*Directeur de la publication et Ĉefredaktanto :*
Lucette ECHAPPÉ
*Imprimé par :*
L' Arbre aux Papiers, 72100 Le Mans
Dépôt légal à parution.
*Enpaĝiganto :* Jean-François BLIN
*Redakt- kaj kontrol-skipo :*
Janine DUMOULIN, Patrick LAGRANGE
Anne-Marie ARGNEY,

CPPAP n° 0626 G 86224
ISSN : 1763-1319

**Abonnement à La SAGO : 45 €00 (6 numéros)**

***Kasistino* : Solange VAN LANDEGHEM**
12 rue de Charente, F-18 000 BOURGES
*kasisto@sat-amikaro.org*

**IBAN** : FR32 2004 1010 1237 8529 0L03 314 BIC : PSST FRPPSCE

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Represo de artikoloj permesata kun indiko de la fonto.

# Provizora Programo - SAT Kongreso 2026

| | Dimanĉo 19a | Lundo 20a | Mardo 21a | Merkredo 22a | Ĵaŭdo 23a | Vendredo 24a | Sabato 25a | Dimanĉo 26a | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 8:00 - 9:30 | | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | Matenmanĝo | 8:00 - 9:30 |
| 9:30 - 13:00 | | 9:30 - Inaŭguro de la libroservo<br><br>9:45 - Enkonduko al la *"Regiono, tradicioj kaj interesaĵoj de León"* de Pako Balibrea kaj Naĉjo Kancelo<br><br>**11:00 - Malfermo de la kongreso**<br><br>12:30 - Komuna foto | 9:30 - Libroservo<br><br>10:00 -<br>**1a Laborkunsido:**<br>Jar-raportoj<br><br>12:00 -<br>**LEA-komitato** | Duontaga ekskurso:<br><br>Itinero tra la urbo: muzeoj, vidindaĵoj kaj interesaĵoj (ankoraŭ restas detaloj) | Tuttaga kaj natura ekskurso (kun pikniko):<br><br><u>Itinero:</u><br><br>8:45 - Foriro de la rezidejo<br><br>9:30 - Preni FEVE trajnon (montaran) ĝis la vilaĝeto Valdepiélago<br><br>10:30 - Komenco de la ekskurso. Promenado tra la flanko de la rivero Kuruenjo (Curueño)<br><br>12:30 - Alveno al la vilaĝeto Montuerto<br><br>13:00 - Pikniko kaj diversaj aktivaĵoj<br><br>14:30 - Reveno al la trajnhaltejo<br><br>16:30 - Preni FEVE trajnon ĝis León<br><br>18:00 - Alveno al la rezidejo | 9:30 - Libroservo<br><br>10:00 -<br>**3a Laborkunsido:**<br>Venont-jara kongreso<br><br>12:00 - Komunista kaj Liberecana frakcioj<br><br>12:30 - Aliaj frakcioj | 10:00 -<br>**4a Laborkunsido:**<br>Gvidrezolucio kaj Deklaracio<br><br>*(en alia sidejo: "Palaco de Conde Luna")* | Foriro de la kongresanoj | 9:30 - 13:00 |
| 13:00 - 15:00 | | Tagmanĝo | Tagmanĝo | Tagmanĝo | | Tagmanĝo | Tagmanĝo | | 13:00 - 15:00 |
| 15:00 - 16:00 | | Siesto / ripozo | Siesto / ripozo | Siesto / ripozo | | Siesto / ripozo | Siesto / ripozo | | 15:00 - 16:00 |
| 16:00 - 19:00 | Akcepto de la kongresanoj | 16:00 - Prelego:<br>*"Romanoj kaj filmoj pri la Hispana Enlanda Milito"* de José Salguero<br><br>17:00 - Prelego:<br>*"Rekviemo por hispana kamparano"* de Antonio Valén<br><br>18:00 - Filmo:<br>*"La instruisto kiu promesis la maron"* (ĝis la 19:50) | 16:00 - Prelego:<br>*"Arbaraj fajroj en Nordokcidenta Hispanio"* de Pako Balibrea<br><br>17:00 - Prelego:<br>*"Virinoj por la paco"* de Claudine Gueguen<br><br>17:30 - Prelego:<br>"Rifuĝintoj en Grekio" de Annie Grente<br><br>18:00 - Prelego:<br>*"Maruja Mallo, forgesita pentristino"* de Ana Manero | 16:00 -<br>**2a Laborkunsido:**<br>Laborgrupoj<br><br>17:00 - Prelego:<br>*"Esperanto en la milito"* de Toño del Barrio<br><br>18:00 - Prelego:<br>*"Eksterlandanoj en la milito"* de Xavier Alcalde | | 16:00 - Rekupero de la Historia Memoro (ankoraŭ restas detaloj) | 16:00 -<br>**4a Laborkunsido:**<br>Gvidrezolucio kaj Deklaracio<br><br>*(en alia sidejo: "Palaco de Conde Luna")*<br><br>18:00 - **Fermo de la kongreso** | | 16:00 - 19:00 |
| 19:00 - 21:00 | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | Vespermanĝo | | 19:00 - 21:00 |
| 21:00 - 22:00 | Interkonatiĝa vespero | Ateliero: "Kulturo en Kongolando" de Jerou Banyanga | *"Taberna el Cuervo"* (trinkejo "La Korvo") | Komuna kantado | Komuna kantado | Tradicia muziko je la strato | Adiaŭa vespero | | 21:00 - 22:00 |

# PLI DA INFORMOJ RETE

**Kongresa aliĝilo**

https://framaforms.org/99a-sat-kongreso-leono-19-26a-de-julio-2026-1762596462

**Listo de aliĝintoj**

https://sat2026leono.org/listo-de-aligintoj-gis-la-24a-de-decembro/

**Kiel atingi Leono-n?**

https://sat2026leono.org/kiel-atingi-leono-n/

**Rezidejo**

https://sat2026leono.org/rezidejo/

**Kongresejo**

https://sat2026leono.org/kongresejo/

**Provizora programo**

https://sat2026leono.org/provizora-programero/

**Organiza Kongres-Komitato**



La unua kunveno de la OKK dum vintro 2026. Ni rigardas neĝon ĉe la placo de la katedralo (Leono).

**Membroj de la Organiza Kongres-Komitato :**

- Pako Balibrea, prezidanto
- José Salguero "Kani", programo, ekskursoj
- Carmen Cidoncha "Karmela", akceptejo, rezidejo
- Ignacio Cancelo "Naĉjo", kongresejo, ekskursoj